

16a de septembro 2024
en busoj inter Poznano kaj Bruselo.

Saluton estimataj Esperanto-aktivuloj.

Ĉi tiu letero estas direktita al (la estraroj de) Esperanto-asocioj kaj kluboj, pri kiuj ni pensis rilate al la [15-a JES](#), okazonta unuafoje en Belgio de la 27a de decembro 2024 ĝis 2a de januaro 2025. Alskribas vin Delfeno, komunikisto de la Organiza Teamo (OT).

Ĝenerale, ĉi tiu letero celas informi, sed ankaŭ malfermi pordon al kunlaboro rilate al disvastigo de informoj al kaj pri (precipe) junulara Esperanto-movado Eŭropa, kaj tre konkrete peti vian helpon pri unu iniciato nia.

Jen la enhavo de ĉi longa letero :

[A\) sinprezento kaj strategiaj celoj de la OT de JES24-25 \(p.1\)](#)

[B\) nia peto al vi \(p. 3\)](#)

[C\) nia propono al vi \(p.4\)](#)

[Ĉ\) niaj esperoj \(p.5\)](#)

[D\) aneksaĵoj \(p.6\)](#)

A)

Por bona interkompreno, mi unue prezentu min kaj la ĉiĵaran perspektivon al organizado de la Junulara E-Semajno. Tamen sentu vin libera transsalti ĉi tiun parton de la letero, ĉar ĝi ĉiukaze ne enhavos rektan peton al vi, kaj povas esti ke ĝi enhavas nur vidpunktojn pri kiuj vi jam konsentas aŭ eĉ jam priparolis rekte kun mi. Ni ne deziras malŝpari vian tempon.

Mi nomigas min « Delfeno » en Esperantujo, sed kelkaj ankoraŭ konas min kiel Pjotr De Mulder. Tuj post reveno el la pasintjara JES en Storkow, Germanio (pli precize : en la trajno hejmen), mia amiko Korsako (Thomas Demeyere) priparolis kun mi la mankon de klara perspektivo pri la sekvonta JES kaj sugestis ke ni do mem ekorganizu ĝin. Post konsento de kelkaj organizintoj de pasintaj JESoj (Michaela Stegmeier, Christine Brücker *respektive Orcino kaj Bizono*) kaj intertempe teamiĝante kun pliaj amikoj (Ben Indestege, Clarissa Lohr, Camille Berger *Lampido*, Valère Doumont *Lupo*) ni ekis ĉi tiun organizan aventuron jam en januaro, kaj tuj celis ne nur 'okazigi' la sekvan JES, sed ankaŭ **plibonigi ĝin**.

Kial plibonigi ? Dum partoprenado en la pasinta JES kaj kelkaj IJK-oj, ni konstatis ke estas iom mirinda kaj laŭ pluraj bedaŭrinda dinamiko rilate al la nuna junulara uzantaro de Esperanto: unuflanke ekzistas granda entuziasmo pri la rimarkebla alfluo de 'nova grupo' da junaj Esperanto-parolantoj, foje resumita kiel 'la dum-KOVIMaj malkovrintoj de Esperanto', kaj daŭre evidentas ke interretaj iniciatoj kaj platformoj permesas pli naturan tutmondigan interrilaton inter individuoj ie ajn en la mondo. *Menciindas ke pluraj Erasmus+ projektoj de TEJO (ekz. [la muzikaloj](#)) estis celkonscie verkitaj por liveri enrete ĝueblajn rezultojn, ĝuste por rekoni kaj plunutri la enretan junularan Esperanto-vivon.* Aliflanke minacas al la 'klasikaj' Esperanto-kunvenoj la tendenco ke junuloj ŝajne progrese malpli aliĝemas al formalaj asocioj, kun gravaj konsekvencoj ke des malpli facile renoviĝas kernaj teamoj de organizemuloj ene de la ekzistantaj strukturoj. Ne



malkiel la konataj 'vezikaj' kaj malcentremaj ecoj de sociaj medioj kaj komunikaplikaĵoj, nunaj junaj entuziasmoj pri Esperanto (kiuj ja daŭre aperadas) preferas engaĝiĝi por projekto-bazitaj, unuopaj projektoj kun laŭeble plej internacia amikaro kaj malplej fiksa administrado. *Ekzemple en la 12a de aprilo sukcese [kunvenis 20-o da junuloj en Bruselo pro ĉeesto de internacia TEJO-delegacieto kaj tre libera propono pasigi la vesperon kune, tute sen formala aliĝilo aŭ kotizo. La ideo estis proponita nur du semajnojn antaŭe, kaj laŭ mi la ĉefa entuziasmigo estis ke kunvenus 'ne nur Belgioj'. Krome ja ankaŭ gravis ke la ideo naskiĝis dum IJF en Italio, kie do formiĝis la amikecoj kiuj insipris al kupto de tiu okazo por revidiĝi kaj inviti eĉ pliajn amikojn.](#)*

Ni, la OT de JES24-25, konsistanta ĉefe el 'roveroj' de la movado de la Verdaj Skoltoj (t.e. *plenkreskaj anoj kiuj ne estas gvidataj de skoltestroj laŭ klasika skolta modelo, sed memstare elektas projektojn por kontribui al plibonigo de (parto de) la mondo, kiel ĉifoje ni elektis kontribui al la Eŭropa junulara Eo-movado*) kredas ke pluvalorigo de la ĉeestaj junularaj kunvenoj indas, kaj ke por tio **necesas konscie investi** pri kelkaj aferoj, kiuj ne ĉiam atingas la atenton de organizantoj de unuopaj junularaj eventoj, kaj kiuj eble pasintece simple ne ĉiam estis same gravaj.

- 1) La solvo por **flegi 'junulecan' etoson** dum JES, en kiu lastjare proksimume triono de la partoprenantaro estas pli aĝa ol 35 jaroj, NE estu forbaro aŭ malkuraĝigo de pli aĝaj aliĝemuloj (*kiel oni de tempo al tempo pripensemas en junularaj Eo-organizoj*), sed aktiva organizado de kondiĉoj kaj reklamado por junula publiko. Tio signifas prioritigon de malkosteco super komforto por faciligi la partoprenon de studenta kaj alia ne-(jam-)pagipova junularo. Tio signifas elekton de buntaj, aktivigaj aŭ furorecaj programeroj kiel centraj allogaĵoj, ofte ligitaj al 'noktoviva kulturo'. Tio signifas ripeteman, bildo-riĉan, facile disvasitgeblan kaj interkonekteblan disvastigon de informoj pri nia evento. En [nia retpaĝo pri kotizoj](#) legeblas pli da klarigoj pri niaj buĝetaj decidoj.
Esperantistoj el aliaj aĝkategorioj pli memstare juĝu ĉu plaĉas al ili nia evento, kaj precipe pliaĝuloj – en Eŭropo ofte pli pagipovaj homoj ol junuloj (almenaŭ studentoj) – kontribuu krom per sia ĉeesto, ankaŭ per pli granda financado de la organizado.
- 2) Ni tutcerte ne estas la unuaj opiniantoj ke la movado bezonas investi je **aktiva bonvenigo de novuloj**, sed ni ja estas aparte konvinkitaj ke ĝuste kadre de tre internacia evento eblas kapti la atenton de junuloj kiuj ne jam havas ligan kun la organizita Esperanto-movado: ĉu anoj de la 'Duolingo-generacio' kiuj jam iom regas Esperanton sed neniam pensis pri reale uzi ĝin, ĉu junuloj vojaĝemajn aŭ exploremajn kiuj entute neniam aŭdis pri Esperanto... Ni kredas ke multe pli indas al nuna junularo proponi riĉan, iom ekzotan ferian sperton kiel kialon por ekesplori nian lingvon, ol enkonduki la lingvon per emfazo de iom abstraktaj valoroj kaj vizioj kiel egaleco aŭ propedeŭtika valoro.
Tia bonvenigo realigeblas per adaptitaj varbiloj, merkataka aliro kiel sponsora rabato, alireblo de ĉiuj informoj en aliaj lingvoj ol Esperanto (*pri tio ni bedaŭras esti ne jam progresintaj: nia [retpaĝaro pri JES](#) ĝis nun konsulteblas nur en Esperanto...*). Krome tia bonvenigo evidente postulas novulan programon dum la evento mem, por pligrandigi la ŝancon ke ĉi tiu unua renkonto de Eo-gejunuloj entuziasmigus la novulon plu-esplori la komunumon kaj eble iam aktive subteni niajn organizojn.
- 3) Koresponde al la idealoj de egaleco kaj tutmonda interkonektiĝemo kiuj estas komunaj al ambaŭ la Esperantistaj kaj skoltaj movadoj, la ĉijara JES-teamo deziras kunveniĝi plejeble **tutmondan partoprenantaron**. Ni seniluzie konscias ke JES estas



kore Eŭropa evento, kaj same konscias ke jam nure en nia kontinento sufiĉas la defioj kaj kostoj monaj kaj tempaj, por kompreni ke probable la nombro da junuloj kiuj ŝatus veni al nia evento, pli grandas ol la nombro da junuloj kiuj efektive venos. Nek JES, nek antaŭe IS nek AS portis la simblan ŝarĝon de reprezento de tutmonda Esperantista junularo. Tamen ni kredas ke en nuna tempo ne plu simbole, sed reale pli kaj pli da Esperantistaj junuloj spertas enrete la potencon de rekta interrilato je tutmonda skalo, kaj ni volas ke JES evoluu al pli forta speguligo de tiu realeco. Unuan paŝon al tiu celo ni realigis jam per frua kaj atentema organizo de « [solidara JES-fonduso](#) » per kiu ni jam sukcesis aprobi subtenon al 3 ekster-Eŭropaj partoprenantoj (po unu junulo el Sud-Ameriko, Afriko kaj suda Azio). Al tiu fonduso daŭre bonvenas donacoj kaj kandidatiĝoj, ĉar ekde nun ni ankaŭ subtenos kelkajn Eŭropajn Esperantistajn junulojn kiuj ne sukcesas plene memstare financi sian vojaĝon kaj partoprenon al JES.

- 4) Pro diversaj kialoj, inter kiuj la ĉisupraj 3 celitaj investoj, ni opinias inda ne nur fokusiĝi je nia 'interna kuirejo', necesa por dividi la plej necesajn taskojn inter la detale informitaj kaj implikitaj teamanoj por praktike antaŭeniri en la pretigado de granda evento, sed ankaŭ dediĉi iom da tempo al esploro kaj eventuale starigo de **kunlaboroj kun aliaj Esperanto-organizoj**.

Rimarku ke ne estas tre memevidenta ke la asocio Verdaj Skoltoj vzw estu respondeca pri ĉi tiu junulara evento. Se ni ne havus tiom fortan skoltestran teamon lastatempe, ke ni fidus ke ni povas daŭrigi la skoltan agadon en Esperanto por adoleskuloj dum kelkaj inter ni ŝarĝiĝas per respondeco pri JES, ni ja tute ne farus tion, ĉar ĝi ne rekte rilatas al la kerno de nia projekto. Sed kiel ni instruas al niaj skoltoj per aktiva malformala lernado en praktiko: kunlabore oni estas pli fortaj, do ankaŭ la junulara Esperanto-movado ne haltu ĉe la konstato ke nek Germanaj nek Polaj junuloj ĉijare sentis sin pretaj organizi JES, kaj anstataŭe ni trovu kreeman solvon por tamen havi 15-an JES-on en 2024. Eble la nuna junulara stilo 'engaĝiĝi por unuopaj projektoj nur' estu la signalo por komunigi JES kiel respondecon de ĉiuj ajn aktivemaj Esperanto-junuloj en Eŭropo, anstataŭ unu aŭ du landaj sekcioj.

Pli da partoprenantoj en JES signifas pli da ĝojaj Esperantistoj, signifas pli da ŝanco kunigi novajn homfortojn por transperni respondecojn, signifas pli da kapablaj kaj motivitaj Esperantistoj por daŭrigi aŭ subteni iam la agadon de asociaj kiel la via. Kaj por reveni al la komenco de la cirklo : diskonigo de la informoj pri kaj oportunaj ebloj por partopreni al nia evento, fare de asocioj kiel la via, helpas al pligrandigo de la partoprenantaro.

B)

Kio estas **nia peto** ?

Kadre de niaj klopodoj venigi pli da novuloj al JES – kalkulante je la subjektive informita hipotezo ke diversloke en la (interreta) mondo ja estas relative multaj junaj Esperanto-lernintoj aŭ lernontoj kiuj bezonas nur iom pli da puŝo aŭ allogo por ekdecidi veni al Esperanto-renkontiĝo – ni tre aprezas la partnerecon kiun akceptis la Germana Esperanto-Asocio kune kun sia junulara sekcio GEJ : ili sponsoros ĉiun junulon el Germanio, aliĝonta al JES kiel al unua fizika Esperanto-renkontiĝo, per provizo de €50-a kotizrabato (vidu anekson 5 por detala modelo de la interkonsento).

Ni nun **demandas ankaŭ vian organizon iĝi novulo-patrono**, ĉu pro landa, regiona, junula aŭ eĉ faka reprezentemo. Ni petas alskribi nin kun propono aŭ demandoj pri kiel konkrete difini tiun



patronadon : ĉu precizante la ekzaktan aĝkategorion, monsumon, kvanton da subteneblaj junuloj... Aŭ rigardu anekson 1 por proponata modelo.

Due, ni demandas vin **disvastigi niajn alvokojn**. Pro la simpla fakto ke niaj mesaĝoj en Facebook, Instagram kaj Telegram ne atingas jam ĉiujn angulojn de Esperantujo, kaj des pli evidente ne ĉiujn homojn ekster Esperantujo, ni sentus nin kuraĝigataj en niaj klopodoj, se la varbiloj, kiujn ni preparas, estu pli vaste efikaj ol tiom kiom ni sukcesas utiligi ilin kun niaj propraj, limigitaj fortoj kaj videbleco. Kvankam en punkto 1) de ĉisupra prezento de nia organiza aliro mi menciis ripeteman varbadon, en kunlaboro kun vi ni proponus fokusiĝi unuavice je maksimuma disvastigado de kelkaj bonkvalitaj varbiloj, kaj do adaptitaj al la celpubliko kiun vi imagas atingi por ni. Eblus labori laŭ pensmaniero ke, kiam temas pri nombroj kaj probableco de ‘unu plia aliĝo al JES’ post ‘X’ da novaj alklakoj de iu reklamilo, ‘malbona videbligado ne ekzistas’ kaj do simple kundividi en publikaj forumoj ion ajn kion ni publikigas tra niaj kontoj. Tamen post konsidero de la diversecon de la alvokoj por ĉijara JES, el kiuj mi aldonas kelkajn en aneksoj 2-5 de ĉi letero, ni sugestas ke vi aparte kontaktu nin por priparoli la plej oportunan strategion en via influ-sfero.

Trie, kaze ke ni ne trovos la homfortojn por traduki nian retejon kaj aliĝilon al via nacia lingvo, ni ĝojus se vi pretus prizorgi **kontaktpersonon al eventualaj novuloj subtenotaj de vi**, por ne nur konfirmi la sponsoradon, sed eĉ gvidi ilin tra plenigo de la detala, longa, Esperantlingva aliĝilo kaj tra eventualaj demandoj kiujn ili havas rilate al informoj en la retejo, kaj tra starigo de demandoj per retroŝtmesaĝo al jes@esperanto.de. Ni kredas ke unuopa kontakto tia inter ano de via organizo kaj junulo kulture aŭ lingve pli proksima al vi ol la organizteamo de JES, estus ne nur solvo de manko niaflanko je ideala bonvenigo de novuloj per plurlingva retejo, sed eĉ tre efika speco da ‘mentorado dum praktika Esperanto-lernado’.

Perfekta argumento por la indo de tia persona investo, estus iama membro de la Verdaj Skoltoj kaj fondinto de la bone konata scienca blogo “[Scivolemo](#)”: Frank v..an Herttrooij Pongo, kiu (*konfesinde: en aliaj cirkonstancoj, inter alie pro tro juna aĝo por sole vojaĝi*) fakte dum jaroj korespondadis kun Nederlanda Esperantistino antaŭ sia unua partopreno en junulara Esperanto-evento (*kiu cetere ankaŭ tiam okazis kunlabore inter du organizoj: NEJ kaj EN*).

C)

Kion ni proponas ?

Unue, ni ŝatus ke ĉi tiu kunlabora formulo iĝu vidata, facile komprenata kaj prefere eĉ ripetebla en sekvontaj jaroj aŭ aliaj eventoj. Do laŭ ‘merkatika’ sinteno ni donu nomon al la koncepto : « novulo-patrono », kaj ĝisdatigus nian retejon kaj pli poste niajn novaĵleterojn kaj programafiŝojn al la partoprenantaro tiel, ke bone videblos **logotipa aŭ alia mencio de ĉiuj patronoj**, samkiel oni kutimas fari kun sponsoroj en la sporta mondo ekzemple.

Due, ni dekomence provizis nian aliĝilon de butono ‘mi membras en TEJO/DEJO/PEJ/GEJ’, de la demando ĉu tiu ĉi JES estus la unua Esperanto-renkontiĝo al kiu la aliĝanto partoprenos kaj de permeso-peto uzi tiujn informojn laŭ niaj organizaj necesojn. Tiujn informojn ni volus do utiligi por sisteme **alskribi** tiujn, kiuj eble spontane aliĝas sen peti sponsoradon tra via organizo, **kun propono membriĝi en sia landa sekcio** – partnero de JES. Tiun kontakton tra nia retroŝtadreso ni povus kunorganizi kun vi, ekzemple inkludante leteron aŭ iujn aliajn invitojn de via asocio.



Trie kaj *aldone* al la videbligo de niaj novulo-patronoj en niaj internaj komunikiloj (novaĵleteroj al aliĝintoj, retejo kaj programfolioj), ni ankaŭ povus krei laŭ la 'hejma stilo' de JES varbilojn kun mesaĝoj nome de aŭ favore al via asocio kaj disvastigi ilin laŭ niaj kontoj, direktitaj al laŭeble plej larĝa junulara Esperantistaro (*en la jam menciitaj Telegram, Instagram kaj Facebook, sed ankaŭ Reddit, X, Discord, MiaVivo, eble estonte ankoraŭ Whatsapp aŭ Signal se bezono montriĝus, eventuale TikTok (kvankam ni ĝis nun ne komencis treti tiun malstabilan grundon...)*). Alivorte, ni pretus iĝi portempe kaj iagrade viaj **ambasadoroj en la junulara Esperanto-movado**, ne tre facile penetrebla kaj iom ĥaosa, kaj utiligi al vi nian videblan pozicion.

Mi nun konscie skribas iom pompe, ĉar mi mem antaŭe subtaksis kiom da laboro kaj ĉeesto en la retaj medioj necesas por atingi ene de unu semajnfino 'nur' 200 spektantojn de Jutuba klariga filmeto plene en Esperanto verkita. Laŭ nia sperto, samkiel laŭ la sperto de la tre rekomendinda [Instagram-aktivulino](#) Lulu Testudo, sukcesa reta varbado petas tamen konscian strategion, eĉ ene de nia malgranda eo-junulara komunumo. Tial ni ja preparolu kun vi laŭ preciza enhavo de la disvastiginda mesaĝo, kiel nia ambasadora rolo aspektu.

Ĉ)

Kion **ni esperas** ?

Estu klara al ĉiuj ke nia ambicia agemo ne signifas ke ni atendas miraklojn. Renkonti en JES po 1 ĝis 2 novuloj – atingitaj sen persona kontakto kun iu kiu jam partoprenos JES-ojn – el Belgio kaj najbaraj landoj laŭ ni jam estus granda atingo kvankam ne vere rimarkebla 'kresko' de la tuta partoprenantaro. Sed male al Afriko, kie ŝajnas aperadi unu post la alia novaj esperanto-kursoj instruataj en publikaj lernejoj, en Eŭropo nuntempe ne ofte videblas samtempa kunigo de 6 junaj novuloj, krom en kelkaj universitataj kursoj, kio videble bonfartigas la Katalunan kaj Italian organizojn KEJ kaj IEJ.

Kvankam ni relative modeste estimas la realisman rezulton en tiu ĉi plej rimarkebla formo, ni ja havas esperojn je pli. Dum niaj novaj klopodoj (kompare kun pasintjare almenaŭ) ni esperas :

- ✓ je dinamiko en kiu pli normalige la supozo ke al JES venos kelkaj homoj sen antaŭa sperto en Esperantujo, ke kongresanoj tiom alkiutimiĝus al la ekzisto de varbiloj por ne-jam-esperantistoj (*kaj ideale : tradukita al naciaj lingvoj retejo...*), ke eĉ sekonscie al ili la ideo inviti siajn ne-esperantistajn amikojn, gestudentojn, konatojn ktp, iĝu pli natura, pli facila tasko.
- ✓ je paŝo direkten al revalorigo de la klasikaj Esperanto-organizoj el la vidpunkto de junuloj.
- ✓ je inspiro al venontaj organizantoj de junularaj eventoj ke ili ekvidu sian taskon ne nur kiel servon al jamaj komunumanoj, sed ankaŭ kiel diskonigadon de Esperanto (*kio de multaj junuloj estas konsiderata tasko ne de organiza teamo, sed de la Esperanto-asocioj...*).
- ✓ je pruvo ke novaj junaj organizantoj kiuj ne havis la sperton de plurjara maturiĝo dum obeservado aŭ helpado de pasintaj organizaj teamoj (*situacio laŭ mi pli kaj pli ofta*) bezonas nur kontakti aliajn organizemajn esperantistojn por ricevi iuspecan subtenon kaj senti sin pli kapablaj atingi sufiĉe grandan publikon kaj do sufiĉajn aliĝojn.

D)
Aneksaĵoj.

Aneksaĵo 1 : propono de vortumo de la kondiĉoj de 'novulo-partonado'.

GEJ+GEA kune subtenos ĉiun personon ĝis 35 jaraĝa, loĝantan en Germanio, kiu partoprenos al JES 24-25 kaj neniam antaŭe partoprenis fizikan Esperanto-renkontiĝon, per novula subvencio de €50 kaj senpaga membriĝo al GEJ aŭ GEA, se tiu persono ne jam membras. La subvencio estos rabato al aliĝkoto, kiun la asocio pagos al JES anstataŭ la kandidato.

Aneksaĵo 2 : varbilo por kutimaj aktivaj Esperanto-komunumanoj.

Cifereca afiŝo pri 100+ aliĝintoj fine de la dua aliĝperiodo (kun alklakeblaj ligiloj 'en' diversaj bilderoj).

Kaj ĝiaj instagramrakontaj versioj (tie ne eblas alklaki la ligilojn, kaŝitajn en la afiŝo) :



Aneksaĵo 3 : alvoko al subtenemaj Esperantistoj donaci al la solidara JES-fonduso.

<https://www.facebook.com/photo?fbid=852431323588269&set=pcb.852431360254932>



Aneksa 4 : alvoko al junuloj kandidatiĝi por ricevi subtenon de la JES-fonduso.

https://www.instagram.com/p/C716Bzvt8v2/?img_index=1



Aneksa 5 : alvoko al novuloj kaj ne-esperantistoj malkovri ĉi tiun internacian junularan feston.

https://www.youtube.com/watch?v=MtYL_BYQ9P8&t=28s



Junulara E-Semajno
13 septembro om 11:23 · 🌐

Saluton!
(this means "Hello" in Esperanto)

Have you ever heard of the multicultural youth gathering JES? this video will tell you all about it - just find the subtitles in your preferred language (and let us know in which yet unavailable language we should translate them next!)
https://www.youtube.com/watch?v=MtYl_BYQ9P8

#Esperanto #junularaesemajno #verdajskoltoj #tejo



Kio estas JES? Ĝuu Esperanton en Belgio! | What's JES? Enjoy Esperanto in Belgium! Nu bellen

👍 5

👍 Vind ik leuk 💬 Opmerking plaatsen ➦ Delen

★ **/Esperanto** · 3 days ago
JunularaE-Semajno Por informi novulojn

Kio estas JES? - klarigoj por komencantoj kaj ne-esperantistoj.

Aktivismo

Ĉu vi jam foje klopodis konvinki viajn ne-esperantistajn amikojn partopreni Esperanto-eventon kun vi? Ne ĝiam facilas klarigi al homo kiu neniam vive ĉeestis en la komunumo, kio okazas dum tia kunveno, kaj des pli malfacilas kompreni kio distingas la diversajn Esperanto-kongresojn inter si. Por subteni tian "buŝ-al-buŝan" reklamadon, ni kreis ĉi tiun videon pri la Junulara E-Semajno. Ni ankaŭ verkis subtitolojn en diversaj lingvoj (kaj ĝojus pri kontribuoj per tradukoj al pliaj) por doni ŝancon al eventualaj interesitoj kiuj eĉ ne jam eklemis Esperanton, sed eble interesiĝus komenci tion post ke ili eksciis pri ĉi tiu eblo festumi en internacia etoso..?

Volonte diskonigu, komentu kaj kontribuu per retrokuplo aŭ tradukado.
Pri la son- kaj bildkvalito okazis malatenditaj fuŝoj, kiujn nur parte eblis ripari. Refari la projekton meze de aliaj farendajfoj rilate al la organizado de JES estis praktike ne ebla sen granda prokrasto, tial ni tamen publikigis tiujn malpli kontentigajn materialojn... Eble venontfoje ni pli bone sukcesos?

https://www.youtube.com/watch?v=MtYl_BYQ9P8

👍 13 💬 1 🔔 ➦ Share 🚩 Report

Post Insights
Only the post author and moderators can see this

1.8K Total Views	100% Upvote Rate	1 Comments	7 Total Shares
----------------------------	----------------------------	----------------------	--------------------------

Hourly views for first 48 hours

